greson: Ĉeestis la Kongreson iu esperantisto el Kanado kiu neniam antaŭe estis drinkinta cidron. Post partopreni en la antaŭe menciita Espicha-festo, tiu samideano en la ceteraj tagoj de la Kongreso, kiam li aliris al la hotela kafejo por la matenmanĝado, li ĉiam insiste petis al la kelneroj cidron por matenmanĝi.

Sekvintage matene okazis Ĝenerala Kunsido de HEF, en kiu oni debatis kelkajn aferojn. Oni legis kaj aprobis la Raporton de la agado de la Federacio dum la lasta jaro, kaj la financan situacion. Oni informis pri la projekto de la Federacio starigi en Madrido konstantan Oficejon. Oni petis helpon al la Ministrejo pri Edukado kaj Scienco, kiu donacis 100.000 pesetojn por la projekto. La Asembleo prenis iujn decidojn pri la Eldona Fako, la Libro-Servo kaj la redaktado de "Boletín", ĉio demarŝata de iu aktivulino, Inés Gastón, de Zaragozo.

Posttagemeze de tiu tago estis prelego de Profesoro Félix Díez Mateo, pri la temo "Ĉu la hispana lingvo estas en mortdanĝero?", sed la teksto de la prelego estis legita de la Sekretario de HEF, ĉar la profesoro Mateo ne povis persone ĉeesti. Vespere okazis tre interesa koncerto: la urba orkestro de Mieres ludis, honore al la gekongresanoj, la himnon "La Espero", kaj tri aliajn muzikpecojn. Tuj poste, la ĥoro de la sama urbo kantis kelkajn belajn kanzonojn, kiuj tre komplezis la ĉeestantaron.

La 22an de julio, antaŭlasta tago de la Kongreso, unue estis prelego en Esperanto de la HEF-Prezidanto Angel Figuerola Auque, pri la temo "Sincereco, objektiveco kaj vereco, fundamentaj normoj por la disvatigo de Esperanto". La preleganto avertis kontraŭ falsaĵoj, kontraŭ blufoj, kontraŭ ĉio nevera. Li asertis, ke ĉar Esperanto estas seriozaĵo, ĝi trudiĝos venke pro socia bezono, nepre, sed sur bazo de sincereco.

Pro miskompreno, ne okazis la kutimaj ekzamenoj de Esperanto, kaj anstataŭe kunvenis proksimume dudeko da gesamideanoj, kiuj faris kaj respondis lingvajn demandojn, rakontis kuriozajn anekdotojn kaj amuzajn spritaĵojn, kaj bone profitis la tempon praktikante la lingvon, kio, ja, estas unu el la ĉefaj celoj de la Kongresoj de Esperanto.

Je la 19a horo, okazis la oficiala fermo de la Kongreso, kiun prezidis la Urbestro de Mieres, la Provinca Delegito de la Ministerio pri Informado kaj Turismo, kaj la Prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio**. Post paroli la Urbestro kaj la provinca delegito pri Turismo, esprimante ilian esperon pri la sukceso de Esperanto, fine, la Prezidanto Figuerola, dankis al ambaŭ aŭtoritatuloj pro ilia helpemo kaj gastameco, kaj konfirmis la decidon de la hispana esperantistaro obstine persisti en sia strebado por sukcesigi nian lingvon, la pacan instrumenton de bela idealo por la homaro. Kaj li deklaris fermita la Kongreson de Mieres. Je la 22a horo, okazis, kun la ĉeesto de la tuta kongresanaro, la oficiala bankedo, per kiu regalis ilin la Provinca Deputitaro kaj la Urba Konsilantaro de Mieres.

La lasta tago estis plenplene dediĉita al ekskurso: al Kovadongo, Ribadesella… vizito al la cidrofabriko "El Gaiteru", apud Villaviciosa.

